



Giganto Onisaburo Deguĉi revivigas en Parizo

Kiotaro Deguĉi

Verkoj trankvilaj, tamen alireblaj kaj fascinaj

En la malfrua aŭtuno de 1972, en Parizo estis okazanta ekspozicio de arto, tia, por kies efektivigo mi tiel revis, aspiris kaj strebis dum multaj jaroj. Pri tiu ekspozicio la Franca ĵurnalo *Le Monde* skribis: “Ĝis nun, ni vidis ekspoziciojn de Japana kulturo, kiuj ofte donis al ni la senton de nealirebla foreco; sed en la ekspozicio de Onisaburo kaj lia skolo la verkoj aperas trankvilaj, tamen alireblaj, iom kiel la verkoj de Bonnard kaj Renoir. Ni sentas ke ili transportas nin al fonto de vivoforto” (2a de Nov.). Ankaŭ *Le Figaro* laŭdis la arton de la skolo de Deguĉi en sia eldono de la 10a de Nov.; kaj la Novembra numero de *Connaissance des Arts*, Franca revuo pri la artoj, rimarkis: “Onisaburo estas certe unu el la plej gravaj kaj fascinaj personoj de la nuntempa Japana kulturo”. La semajna *Loisirs Jeunes* skribis: “Arto kaj Kredo estas ligitaj, kaj la serĉo por belo estas la fundamenta aspiro de la homaro. Tio ĉi facile videblas el la verkoj de kaligrafio, potarto kaj pentroarto, kaj la ilin akompanantaj titoloj. . . la belo estas universala lingvo”.

Jen nur kelkaj el la eĥoj de la ekspozicio, “La Arto de Onisaburo kaj Lia Skolo”, kiu okazis dum du monatoj (de la 19a de Oktobro ĝis la 17a de Decembro 1972)” sub la oficiala aranĝo de la Pariza Urbo kaj la Cernuschi-Muzeo, kaj sub la aŭspicioj de la Francaj Ministrejoj pri Kulturo kaj pri Eksterlandaj Aferoj.

*) La japana originalo de ĉi tiu artikolo aperis en la monata gazeto *GENDAI* (La Nuna Epoko): en la Februara numero, 1974.

Oomoto

50-a jaro

**n-ro jan.-feb.
(400), 1975**

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio: OOMOTO, Kameoka, Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561. **Poŝta**

ĝirkonto: Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono: 1200 enoj aŭ 12,—ned. guldenoj, **Abonebla** ĉe niaj “Reprezentantoj” kaj ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002 Nederlando.

Kaj la eĥoj ne restis senrespondaj: pli ol ducent ĵurnalistoj kaj kritikistoj vizitis la ekspozicion, kaj pli ol tridek Direktoroj kaj Kuratoroj de famaj muzeoj en Eŭropo kaj Amerikoj — inter ili S-ro Xavier de Salas de la Prado-Muzeo, S-ro Ashwin Lippe de la Metropola Muzeo de Belartoj kaj S-ro Richard Stanislawski de la Lods-Muzeo — aŭdis pri la ekspozicio kaj alveturis vidi ĝin. Tiele, en tre mallonga tempo la plano estis fiksita por 1973 kaj 1974: estis aranĝite ke la ekspozicio okazos sinsekve en Bezanco, Marsejlo, Nico, Kaeno (ĉiuj en Francujo) Roterdamo (Nederlando), Gento (Belgujo). Plie, nia ekspozicio estis invitita al la fama Viktoria kaj Alberta Muzeo en Londono. Ni ĉiuj jubilis: Banzai! ¹⁾

Mia ĝojego estis senmezura ĉe la penso, ke la ekspozicio de artverkoj de mia avo nun ĉirkaŭiros la mondon, ke ni venis longan vojon ĝis ĉi tie, gvidataj de nenio alia ol de nia obstina entuziasmo kaj junula pasio, ke ĉi tiuj ne estis vanaj... Mi rememoris pri mia infaneco, kiam mi estis molestata kiel nepo de tiu, kiun oni stampis ‘ribelulo kontraŭ la nacio’, herezulo aŭ monstro, sed kiun mi nur konis kiel karegan avon; kaj mi rememoris ankaŭ, kiel mi estis feliĉa, kiam, post la milito, la senkulpeco de mia avo estis rekonita de la justico. Mil emociaj sentoj inundis mian koron kaj mi ne sciis kiel min regi.

Fruktodona interligiĝo pere de Esperanto

De la knabeco mi havis grandan deziron diskonigi al la mondo la veron pri mia avo, Onisaburo, kaj, por tion atingi, formiĝis al mi la ideo ke mi faru el publika prezentado de tiuj artverkoj, kiujn li postlasis, plej bonan enkondukon al lia persono kaj penso.

De la somero ĝis en la aŭtuno de 1963 mi vojaĝis, kun mia kolego J. Umeda, al Eŭropo: ni vizitis 57 urbojn en 14 landoj uzante la internacian lingvon Esperanto. Tiu ĉi vojaĝo, dum kiu ni prezentadis la noan muzikon kaj kelkajn aspektojn de la japanaj artoj kaj kulturo uzante diapozitivojn

kaj filmojn, estis granda sukceso, kaj dume mia koro ŝveliĝis de la pli kaj pli kreskanta deziro sekvi ĝin per okazigo de ekspozicioj de artverkoj de Onisaburo en Eŭropo kaj Amerikoj.

Inter ĉiuj artverkoj de mia avo, precipe la “Jōūan” aŭ *raku*-tipaj tebovloj,²⁾ devus kapti la koron de eŭropanoj kaj amerikanoj: per sia kolorriĉa gajeco, per sia brilanta beleco kaj eĉ per sia mistera gracieco ili nepre tuŝus ilin kaj espereble vekus ian sensacion.

Dum mi profundigis en tia pensado mi havis okazon renkontiĝi kun D-ro Ouwehand en Lejdeno (Nederlando), kaj dank’ al li mi ekkonsciis ke mia aspiro povas iĝi pli ol nura revo. D-ro Cornelius Ouwehand estas mondfama aŭtoritatulo pri estetikaj aferoj, kiu tiutempe estis la kuratoro de la Orienta Arto ĉe la Lejdena Muzeo kaj nun prelegas ĉe la Zurika Universitato. Pere de sia edzino, Suzuko, kiu estas mia amikino, li estis koniĝinta



Kiotaro Deguĉi salutas en
la malferma ceremonio en
Muzeo Cernuschi

kun la arto de mia avo, kaj ĝin tiel ŝatis, ke li tuj subtenis mian ideon kaj donis al mi valorajn sugestojn.

Reveninte hejmen de Eŭropo, mi kolektis miajn impresojn pri la 110-taga vojaĝo en verkon; ĝi estis eldonita de Asahi Ŝinbun en 1965, sub la titolo “Mia Rondvojaĝo en Esperantujo”. Ĝin baldaŭ sekvis mia alia verko, biografio de mia avo, titolita “Giganto Onisaburo Deguĉi” kaj eldonita de Kōdanŝa en 1967. Ĉi tiu libro tiel multe impresis Prof. Kuninosuke Macuo, renomman specialiston pri la franca literaturo, ke li volontis mem traduki ĝin en la francan. Sekvis pliaj interkonatiĝoj unu post alia: dank’ al la amika interveno de Prof. Macuo mi konatiĝis kun franca ŝtatisto, S-ro François Missoffe, Eksministro pri Sportoj kaj Junularo, kiu siavice prezentis min al Prof. Vadime Elisseeff, Direktoro de la Cernuschi-Muzeo en Parizo kaj eksperto pri la Orienta arto. Li afable akceptis min kaj promesis al mi unu fojon viziti la Centron de Oomoto, por vidi mem la verkojn de mia avo kaj konsideri la eblecojn de ilia ekspozicio en Eŭropo.

Kiel promesite, li vizitis nin ĉe Kameoka en Oktobro 1971 kaj vidis la potaĵojn, kaligrafiaĵojn kaj tuĉpentraĵojn de mia avo, kaj ankaŭ la verkojn de mia avino, patro, patrino kaj aliaj anoj de la Deguĉi-familio; dum li aprecadis ilin, li entuziasmiĝis kaj decidiĝis okazigi ekspozicion en sia propra Muzeo. Ni ŝuldas al lia interveno, ke ĝi povis okazi sub la aŭspicioj de la Franca registaro.

Profundaj antaŭjuĝoj kontraŭ Oomoto

Onisaburo manifestis sian genion en religio, ideologio, arto kaj aliaj sferoj. Li estis tipo de “nesondebla homo”. Li estis naskita en Anao, Kameoka, proksime de Kioto, en Aŭgusto 1871, kaj forlasis la mondon en Januaro 1948. Lia penetrema spirito kaj liaj multflanka aktiveco kondukis al martiriĝo; el la sepdek-ok jaroj, kiujn li vivis, li pasigis sep jarojn tenite en malliberejo. Ne estas troigo diri, ke lia vivo estis uragana kaj plena de malfaciloj. La plej severaj el ĉiuj estis la du “Oomoto-Aferoj”, pro kiuj Onisaburo kaj liaj sekvantoj estis persekutataj de la japana polico.

Li estis malliberigita dum kvar monatoj okaze de la Unua Afero (kiu daŭris de la 10a de Feb. 1921 ĝis la 17a de Majo 1927), kaj dum ses jaroj kaj ok monatoj okaze de la Dua (de la 8a de Dec. 1935 ĝis la 8a de Sept. 1945). En ambaŭ okazoj — diference de la kutimaj kazoj — li restis enkarcerigita ankoraŭ antaŭ deklaro de fina verdikto.

Nu, — se prezenti iom troige la apologion de mia libro, “Giganto Onisaburo Deguĉi”, mi ja skribis ĝin, por plenumi unu taskon, kiun en la mondo ne estas permesite al ni membroj de la Deguĉi-familio eviti, nome,



Onisaburo Deguchi
(1871-1948)

esplori kaj prezenti la vivon de mia avo alnomita “monstro” kaj la veron pri la sensacia Oomoto-Afero, kiu ankoraŭ estas multe envolvita en enigmo.

Iun tagon, baldaŭ post la enmerkatingo de tiu libro, mi aŭdis, ke studento, kiu rimarkis ĝian titolon ĉe la librejo Kinokunija en Tokio, demandis, “Ĉu la Gigantoj iam havis faman direktoron kun tia nomo?” (— la fakto estas ke la “Gigantoj” estas la nomo de unu potenca teamo de profesiaj basbalistoj kaj oni kutime nomas ilian direktoron aŭ ĉampionon: Giganto tiu aŭ tiu.) Mi aŭdis ankaŭ, ke iu maljuneta sinjorino ekgrimacis kaj kulpigis la eldonejon, dirante, “Kia senhonto, ke tia prestiĝa eldonejo kiel Kōdanŝa publikigis libron pri Onisaburo, tiu malhomo!” El ĉi tiuj du

ekzemploj oni povas facile vidi, ke Onisaburo Deguči jam estas tute forgesita kaj fremda al la juna generacio, dum en la memoro de ĉiuj, kiuj nun aĝas pli ol kvindek jarojn, li ankoraŭ vivas nur kiel monstro aŭ nacia ribelulo aŭ la fondinto de fireligio Oomoto. Kaj oni povas nur miri, kiel indiferenta povas esti moderna historio pri la afero apenaŭ ne perdigita en la postmilitaj tumultoj, sed kiel radikalaj restas la antaŭjuĝoj pri homo, ade nutritaj kaj flegitaj de la antaŭmilitaj fortoj kaj amaskomunikiloj.

Antaŭdiroj de Onisaburo

En 1898, kiam li estis dudeksep-jara, mia avo submetis sin al unusemajna asketismo en kavo sur Monto Takakuma en Anao, lia naskiĝloko ; de tiam li profundigis en religian vivon kaj akiris al si psikajn kaj spiritajn fortojn. Li ekkonsciis ke la tempo venos, kiam la homaro atingos la plej altan gradon de evoluo en la spirito de universala amo kaj frateco, kaj la mondo estos unuigita en la politika kaj ekonomia senco kaj regata laŭ la volo de Dio. Tian mondon li nomis *Miroku no Jo* kaj decidiĝis dediĉi sian tutan vivon por ĝia efektivigo.

Jam je la komenco de nia jarcento, el perdita angulo de Tanba-provinco, vualita de la densaj nebuloj, li antaŭdiris jenajn aferojn, ekz-e :

“Baldaŭ vi povos aĉeti ĉe Kameoka-Stacio veturbileton al Parizo”.

“Baldaŭ oni uzos unu saman monon tra la tuta mondo”.

“El la tajdoj kaj el la suno oni akiros provizojn de elektra povo”.

“Komunikiloj faros mirindan progreson per ekspluatado de magneta povo”.

“El maraj akvoj kaj el aliaj substancoj nun neimageblaj oni malkovros novajn elementojn, kiuj fariĝos la fonto de giganta movoforto”.

“Kreiĝos aeroplanoj, kiuj neniam falos pro akcidento, kaj oni povos flugi kien ajn de la mondo en tri horoj”.

“Trajnoj kuros po 600 kilometrojn en horo inter Tokio kaj Oosaka”.

“Surteraj veturiloj per ekleviĝo de sur la grundo kurados” (ĉu ‘aeraŭtoj’?).

“Premante unu butonon hejme en Tanba-provinco, vi povos spekti teatraĵojn prezentatajn en Tokio”.

“Skribitajn vortojn oni sendos per aero”.

Tiuj ĉi okazaj antaŭdiroj de Onisaburo nur mirigis liajn samtempulojn. Aliflanke, li fervore predikadis, ke la tempo venos, kiam unu internacia komuna lingvo estos disvastigita tra la mondo ; kaj ekde la somero de 1923 li energie subtenadis la Esperanto-movadon.

Li asertis ankaŭ, ke, kiel Japanujo estis unuigita post kiam ĝia malnova

reĝimo konsistanta el pli ol tricent feŭdoj estis abolita, tiel same ankaŭ la mondo estos unuigita, kun la nunaj nacioj kunordigitaj en la analogan formon kiel japanaj 'gubernioj' aŭ usonaj 'ŝtatoj', kaj ke tia granda reformo de la mondo plenumiĝos en ne tro malproksima estonteco. Mia avo publikigis 81-voluman verkon titolitan "Rakontoj el la Spirita Mondo" inter 1924 kaj 1934: en parto de tiu verko ni legas ke la mondo estos dividita en dek du regionojn aŭtonomajn kaj pli-malpli memsufiĉajn, kiuj sub Dio kaj sub la suvereneco de la popoloj estos administrataj de unu mondregistaro.

Profetaj kaj avertaj utaoj ŝokantaj la mondon

Mia avo verkis antologion de utaoj profetaj kaj avertaj, kiu, sub la titolo *Iroha-uta*, estis eldonita la 10an de Septembro 1903. Ĝin sekvis du pliaj antologioj: dua *Iroha-uta* kaj *Oomoto-ŝinka*, kiuj estis publikigitaj en la monata organo de Oomoto, *Sinreikai* (Spirita Regno), inter 1917 kaj 1918. Tiuj tri poste estis kunigitaj kiel trilogio, kaj ĉi tiu, sub la nova titolo *Mizu no Ŝinka*, estis eldonita de Oomoto en Januaro 1921.

Ĝi estis nur 86-paĝa broŝuro, sed tamen ĝia enhavo estis tro katastrofa, ol ke ĝi estus ignorebla por la reganta reĝimo. Ĉiu pensanta spirito, kiu hodiaŭ legos tiujn profetaĵojn kaj avertojn, lasus sin tuŝi de la maltimo, kiun mia avo havis sufiĉe, por publikigi tiaĵojn en tiu tempo. Ĉar li antaŭdiris, trafe kiel ni jam scias, la ruiniĝon de la Nipona Imperio, la Tennoan³⁾ deklaron pri sia homeco, kaj skizis la disvolviĝon de la Japana-Ĉina milito en la Pacifikan militon, prezentante eĉ skemon de la mondmilito.

Kio pli mirigas nin, estas, ke la *Mizu no Ŝinka* baldaŭ estis presita en Tokio grandkvante, por atingi kiel eble plej multajn homojn. Ĝi fine skandalegis la registaron kaj ŝokis multajn kiel 'alarma verko'.

Mia avo tiutempe fariĝis la prezidanto de la eldonejo de *Taiŝō Niĉi-Niĉi Ŝinbun* (ĵurnalo) en Oosaka. En ĝia redakcio troviĝis la spertaj ĵurnalistoj, kiel Sosen Torii, Ikuo Oojama kaj Mosaburo Suzuki, kiuj ĉiuj estis elpelitaj el la *Asahi Ŝinbun* pro politika subpremado al ilia plum-aktiveco. Mia avo lanĉis intensan gazet-kampanjon por siaj ideoj per *Taiŝō Niĉi-Niĉi Ŝinbun*, tiel, ke ĝi baldaŭ atingis la eldonkvanton de 480,000 ekzempleroj. Ĉiutaga ĵurnalo eldonata de unu religia organizo pri la kurantaj aferoj de la mondo estis ankoraŭ io apenaŭ konata en tiu tempo: kiam ĝi fine superpotencis la du plej grandajn *Asahi* kaj *Mainiĉi*, ĝi fariĝis objekto de grava socia problemo.

Plie, mia avo daŭrigis sian aktivecon per eldonado de libroj kaj ĵurnaloj. Krom la jam menciita "Rakontoj el la Spirita Mondo", aperis liaj eseoj en la formo de 8-voluma "Verkoj de Onisaburo". Li eldonis ankaŭ poeziajn

volumojn unu post alia, por publikigi entute 100,000 tankaĵojn, kiujn li verkis. Ankaŭ aliaj ĵurnaloj estis eldonataj paralele : la *ŝinrui Aizen Ŝinbun* (eldonkvanto : 1,000,000 ekzl.), la *Zuisō Ŝinbun* (300,000 ekzl.) kaj la *Tōkjō Maijū Ŝinbun* (360,000 ekzl.), same kiel multaj monataj gazetoj ne nur religiaj kaj poeziaj, sed ankaŭ Esperantaj kaj Rōmazi-a (por la latinigo de la japana ortografio).

Kompreneble, al la religia kaj spirita movado mia avo dediĉis sian energion. Li kontaktiĝis kun religiaj kaj spiritaĵoj en Ĉinujo, Vjetnamujo, Germanujo ktp, fondis la Ligon de Mondreligioj kaj la Universalan Homaman Asocion, por efektivigi la unuiĝon de la homaro en unu rondon familian.

Tuton de liaj aktivecoj por arto kaj kulturo, kiom multaj, tiom diversaj, estas neeble resumi ĉi tie. Sufiĉus diri, ke dum sia tuta vivo li enverŝadis sian fortegan energion en ĉiujn kampojn kaj sferojn, kiujn lia aktiveco ampleksis, kaj entreprenis ĉion en granda skalo ne nur nacie, sed ankaŭ internacie.


Terura persekutado al Oomoto

Historion de la du Aferoj de Oomoto oni povus pritrakti laŭ diversaj vidpunktoj kaj ideologioj : kiel ajn estas, neŝanĝebla estas la fakto, ke temis pri perforta subpremado kaj persekutado al Oomoto. La Unua Afero estis terura, sed la Dua estis senkompare terura en la moderna historio de religiaj persekutoj. Oomoto, sub la gvidado de mia avo, jam estis disvastiĝinta kaj elpaŝis eĉ eksterlanden.

Tiam, intervenis la ŝtata potenco, por frakasi la Oomoto-movadon. Laŭ la direktivo de la registaro oni komencis jam detruadi niajn sanktejojn per centoj da dinamitoj, kaj pli ol mil personoj el la gvidantoj kaj sekvantoj estis arestitaj : multaj el ili estis torturitaj kaj perfortitaj, tiagrade, ke ilia sango elŝprucis disen, kaj sinsekvis kazoj de eksterordinara malsaniĝo, frutempa morto, sinmortigo, freneziĝo ktp.

Ne estis tiuj malliberigitaj solaj, kiuj suferadis ; ekstere, iliaj familianoj kaj multaj aliaj Oomotanoj tra Japanujo devis travivi la spertojn de spirita persekuto kaj turmento, kaj elteni mokajn aŭ kalumniajn okulojn.

Ĉar la registaro proklamis sian intencon “ekstermi Oomoton de sur la tersurfaco” kiel fireligion aŭ damnnindan sekton kaj stampis Onisaburon “ribelulo kontraŭ la nacio”, la tutlandaj amaskomunikiloj, submetitaj al la ŝtataj aŭtoritatoj, distrumpetadis ĉiujn eblajn klaĉojn, kondamnante la “abomenaĵojn” de Oomoto, nomante la Centron de Oomoto pandemonio kaj denuncante mian avon per ĉiaj moknomoj : ĉarlatano, blufisto, trompisto,



Jōūan

frenezulo, perversulo, protokanajlo, nacia ribelulo, malhomo, seksmaniulo, fiulo ktp.

Ĉi tiu publika ostracismo kaj kalumniado ŝajnis doni finofaran baton al mia avo kaj liaj sekvantoj ; sed la 31an de Julio 1942 la Apelacia Kortumo deklaris ilin senkulpaj je rompoj de la Leĝo por Tenado de la Publika Ordo kaj ili estis kaŭcie liberigitaj. (La akuzakto je majestatenco estis retenita kiel en la unua juĝo.)

Ses jaroj kaj ok monatoj estis pasintaj de post kiam mia avo estis arestita. Li nun estis 71-jara kaj mi 7-jara. De kiam miaj geavoj hejmen-venis, mia familia vivo tute ŝanĝiĝis. Mia patro estis malsaniĝinta en prizono, kaj dum longa tempo mia patrino plejofte forestis de la hejmo, prizorgante advokatajn kaj tiucelajn monajn aferojn, kaj mi estis soleca kaj malfeliĉa. Ĝuste en tiaj cirkonstancoj mi bonvenigis miajn geavojn hejmen.

Mi kroĉiĝis precipe al mia avo. Kiam mi troe petolis ĉirkaŭ li, li ofte kaptis min per ambaŭ brakoj, kaj kun ĝojrigo al mi baraktanta, pendigis min de la verando. Iufoje, mi eskapis lian kapton kaj li ĉasis min ĝis la perono de la vestiblo, kie li ekhaltis kaj rideksplodis, rigardante min forkuri nudpiede kun liaj getaoj. Alian fojon, kiam ni baniĝis kune, okazis ke varma akvo gutadis de mia bantuko sur lian kapon, kaj li kun jelp' flankenŝovis sin, pensante ke mi pisis sur lin, sed apenaŭ li trovis sin trompita de sia impresoj, li ridegis tenante al si la ventron.

Mia knabeco kontraŭ mokaj maljustaĵoj

Unu vintran matenon dum mia unua jaro de elementa lernejo (tiam nomita : nacia lernejo), bubego el supera klaso puŝegis sin tutkorpe kontraŭ mian fratinon, kriante “Oomoto!”, tiel ke ŝi estis renversita sur la lerneja korto glaciiginta : ŝi rompis al si la kruron. Tiu sceno kun la angora plorkrio de mia fratino restas por ĉiam en mia memoro.

Nelonge post tiu okazaĵo mi mem spertis maljustaĵon. Dum la milito, eĉ la elementaj lernejoj estis sub la influo de militarismo. Ni devis nomi la pordegon de lernejo per militista termino : barakpordego, kaj tie staris kelkaj sentineloj kun fusiloj bajonetportaj. (Tiuepoke, la 6-jara elementa lernejo kavis krome la 2-jaran superan kurson, kies klasanoj deĵoris laŭvice kiel sentineloj.) Ĉiumatene, ni devis kolektiĝi en najbarajn grupojn kaj marŝi al la lernejo en duobla vico. Alveninte ĉe la pordego, ĉiu infano devis, en rekta pozicio, levi sian manon salute al la sentineloj, anonci sian grupan kaj personan nomon, kaj, laŭ la permeso “Pas!”, eniri la lernejon.

Iumatene, kiam mi estis enironta la pordegon, unu el la sentineloj direktis al mi sian bajoneton kaj diris, “He, ĉu vi scias, kiajn malicojn kovis la Oomotanoj?” Mi estis terurita ne tiom de la bajoneto (kiu verŝajne ne uzeblis), kiom pro la tro granda diferenco aĝa kaj fizika inter ni : mi tiam estis ne nur aparta etulo sed malfortikulo. De tiam mi nur penadis lin ĉiel eviti.

Mi ankoraŭ ne sciis, kia, kaj kiel severa, estis la persekutado al Oomoto je la komenco de la Dua Afero ; sed de kiam mi transiris de Kameoka al la elementa lernejo de Takeda (en Hjōgo-gubernio), mi ofte devis, eble pro la ekskluzivema karaktero de provinca urbeto, suferi multe da mokaj maljustaĵoj kaj malagrablaĵoj. Sed ne mankis ankaŭ bonaj spertoj, kiel jena. Iutage, ĉirkaŭ la fino de mia dua jaro de elementa lernejo, nia instruistino donis al ni taskon skribi verketon. Ŝi diris al ni : “Skribu, kion vi vere volas diri!” Ĉar mi fidis al tiu juna instruistino, mi kun vervo kaj febro krajonis frazon post frazo, folion post folio, pri Oomoto, pri miaj geavoj kaj pri miaj gepatroj — pri ĉiuj miaj veraj sentoj, kiuj ĝis tiam estis aŭ subigitaj aŭ repuŝitaj en mian internon. Eĉ knabo, mi ja konsciis, ke iu ajn vortigo pri Oomoto estas tabuo, plena de danĝero por mi ; sed mia favora impresado pri la afabla instruistino lasis, ke mi elverŝu sur paperon mian kompleksan aglomeraĵon da sentoj, indignoj, koleroj kaj ploroj. Mia kraiono nigrigis multajn foliojn : kiam mi finis mian longan frazaron, mi eksentis min malŝargita en la koro. Poste — tio tamen faris min ege maltrankvila : tia senbrida esprimo de miaj kaŝitaj sentoj ne povus ne havi ian gravan sekvon ; sed mia instruistino tenis ĝin en strikta sekreto inter ni.

Nepo de ribelulo iĝas nepo de talenta artisto

Mia instruisto en mia kvara jaro de lernejo (1945) havis malkaŝan antipation el malŝato kaj malamo kontraŭ mia avo kaj Oomoto. Li ridindigis min, alnomante “Ŭani” (kripla simpligo de “Onisaburo”). En siaj klasoj li ofte faris el mia avo temon de kalumuniado, kaj ĉiufoje mia sango ekbolis de siblanta indigno.

Kiam mi finis la elementan lernejon, mi eniris en la mezlernejon Dōshi en Kioto kaj transloĝiĝis en tiun urbon. Ĝi estis bona lernejo kun multaj bonaj instruistoj. Kaj tamen, se ilia okaza parolo ektemis, kiel pri sociaj aferoj, pri Oomoto kaj mia avo, tiam ilia teniĝo ŝajnis ne plu esti tiu de respektindaj instruistoj. Mi sentis ke ilia konscio estas infektita de ia fiksa antaŭjuĝo pri Oomoto.

Iun tagon mi estis invitita de mia klaskamarado al sia hejmo. Dum ni interparolis en lia ĉambro, mi aŭdis du-tri adoltojn frustrantaj en la alia ĉambro, ke mi estas nepo de Onisaburo Deguĉi, kaj ili ŝtelrigardis min tra eta aperturo inter la husumoj. Tia estis ĝenerale la atmosfero, kiu ĉiam kaj ĉie ĉirkaŭis min, malgraŭ ke la milito estis finiĝinta kaj la Oomoto-Afero likvidita. Tial, se mi prezentis min al iu per mia plena nomo kaj se li reagis al mi sen ia malfavora impresio, tiam mi trankvile ekspiris, ĉar en plej multaj okazoj oni ekmontris al mi, kvazaŭ frapite de tiu nomo Deguĉi, asociita kun Oomoto, ian malestimon en sia mieno aŭ en sia sinteno. Neeviteble, mi fariĝis akre sentema en mia rilatiĝo kun ĉiuj kaj mi kutimiĝis laŭeble ne menciigi mian familinomon. Aliflanke, se mi trafis iun, kiu montriĝis simpatia por Oomoto, mi jam entuziasme kaj elokvente parolis al li pri la maljusteco de la registaro kontraŭ Oomoto kaj pri la granda personeco de mia avo.

Ĉirkaŭ tiu tempo, aŭ pli-ĝuste, en la aŭtuno de 1949, ekspozicio de rakuaj tebovoj de mia avo estis inaŭgurita en Okazaki, Kioto; en tiu ekspozicio estis elmontritaj kelkaj centoj da pecoj elprenitaj el la pli ol 3,000 tebovoj, kiujn mia avo produktis post kiam li estis liberigita el prizono, kaj kiujn jam en la printempo de tiu sama jaro “malkovris” renoma kompetentulo pri la ceramiko, S-ro Giiĉiro Katoo, kaj kiuj sekve, komencis fariĝi temo de konversacio inter la ekspertoj kaj kritikistoj. (S-ro Katoo estas tiu, kiu baptis tiujn tebovojn *J-ŭan*, t. e. brilantaj tebovoj.)

Dum ĉi tiu ekspozicio — kiel mi ŝveligis al mi la bruston! Mi estis fiero ke mi estas nepo de Onisaburo Deguĉi, kaj diris al mi ke mi devas inviti pli kaj pli multajn homojn por ke ili aprecu lian arton.

Jōŭan — la miraklaj produktoj de Kredo kaj Pasio

Kakemono: *Gloria Luno*



Kakemono: *Dia Luno*

Mia avo komencis rakuan potfaradon en Decembro 1944. Ankoraŭ dum la milita tempo mankis pigmentoj, glazuroj, argiltero kaj aliaj potistaj materialoj. Eĉ la brulligno ne estis akirebla sufiĉe por lia forno. Pro la ekonomia limigado, vivmalfaciloj, paniko dum la militjaroj la profesiaj potfaristoj sinsekve estis forlasintaj sian metion. Sub tiaj cirkonstancoj mia avo koncentris ĉiujn siajn energiojn kaj pasion por bovlofarado.

La teknikon de rakua potfarado li konis, ĉar jam en la tempo antaŭ la persekutoj li ĝuis tiun arton. De multaj jaroj li tenis en si la deziron redoni sian koncepton pri Ĉielregno en siajn rakuaĵojn: liaj ses jaroj kaj ok monatoj da vivo en karcero estis la tempo de kovado, kiu faris ĝin pasio vulkana.

Li nun enblovadis sian vivon en siajn tebovlojn per preĝado dum li faris ilin. Li preĝis kaj preĝis, knedante argilteron, uzante bambuan truleton, formante aŭ kolorigante la tebovlojn ktp. Liaj kreaĵoj energioj dumlonge baritaj, liaj ideoj per multjara kontemplado maturigitaj nun trovis vojon por torente elfluadi, kaj alprenis al si konkretajn formojn unu post la alia.

Vidante mian avon absorbitan en sia laboro, oni ja povis ricevi la impreson ke kredeble nur la potmajstro Kakiemon estus laborinta en tia furioza maniero, kiel li. Tagon post tago, ĝis noktomezo, li restis okupita en sia laborejo. Kaj pro lia aĝo sufiĉe granda kaj pro lia korpo longe taŭzita en karcero oni timis ke tia intensa laborado nun nur difektus lian sanon. Mia avino kaj aliaj faris la zorgon ĉiel evitigi al li la ekscesojn de sia laborado, sed li elturniĝis lerte, por ŝteliri en sian laborejon. Kiam ilian malhelpon li ne povis eskapi, li restis dome: al la potfarado li substituis pentradon de rakuaĵoj sur ŝikiŝoj.⁴⁾

Pro manko de taŭgaj iloj kaj materialoj li havis multajn malfacilojn. Ekzemple, kiam elĉerpiĝis liaj provizoj de argiltero, li diris: “Ni uzu la koton el la lageto antaŭ mia domo!” Tiel li elfosis la koton kaj knedis ĝin kun aliaj restantaj argiloj, sed ĉi tiu miksaĵo ne tenis sin firme: tebovloj formitaj el ĝi kelkfoje kurbiĝis per si mem. Malgraŭ ĉiuj tiaj malfaciloj li koncentris sin super sia laboro kaj produktadis siajn tebovlojn.

Li ofte diris, “La ĉanojo estas paradiza okupo”.⁵⁾ Lia entuziasmo estis tiel granda, ke li eĉ uzis novan ideogramon por bovlo, por surskribi la fermoplaton de ĉiu ligna kesteto, kiu entenas lian kreaĵon. Ĝi konsistas el la du ideoj kunigitaj: ‘juvelo’ kaj ‘perfekteco’, kaj estas prononcata same kiel la ordinara ideogramo por bovlo. Tio estas eksterkutima ne malpli ol la simila kombino el ‘ŝtono’ kaj ‘perfekteco’, uzita de la ĉanojaj majstroj Enŝū Kōbori kaj Humaikō Macudaira. Mia avo diris, “Mi kreas *tama* — ĉiuj miaj tebovloj estas juveloj”.

Tama (ronda juvelo) havas la simbolan signifon de plena harmonio kaj senmanka kompleteco, t. e. la figuro de io atinginta la kulminon de perfekteco. Mia avo dum sia tuta vivo strebadis al ĉi tiu perfekteco, kaj, por kroni sian tutvivan laboron, li fine donis sin tutan al la esprimado de la beleco de Ĉielregno, transfigurante per ĉiuj siaj fortoj gajan, ĝojan kaj harmonian eĥon de la paradiza beleco en siajn rakuaĵojn, laŭ la ideoj, kiuj regadis lian vivon, kaj per la konstantaj preĝoj kaj meditado.

Kiel originala pensulo, spirita gvidanto kaj predikanto pri Ĉielregno, mistikulo anoncanta la alvenon de Miroku no Jo kaj diverstalenta artisto, mia avo enpreĝis en tiujn 'juvelojn' sian tutan ĥaoson da internaj proprecoj kaj dispozicioj, same kiel la tutan kirlegon da nebuluzoj kaj "logos" de la mondo ekster li kaj en li, kaj forpasis.

"Onisaburo — nur unu persono aperanta en jarmilo"


La artekspozicio de 1972 en Parizo estis granda sukceso. La malferman akceptadon ĉeestis altaj oficistoj el la Francaj Ministrejoj de Edukado, de Eksterlandaj Aferoj, de Sportoj kaj Junularo, kaj multaj aliaj. En sia malferma saluto, la Direktoro de la Cernuschi-Muzeo, S-ro Elisseeff, diris, "La arto de Onisaburo estas plena de energio. Liaj verkoj fascinas nin per sia mirinda vivoĝojo kaj dinamika feliĉego. Lia arto, kiun subtenas lia originaleco kaj kredo, donas al ni grandan plezuron, precipe nun, kiam tiel multaj el la revoj de moderna arto estas disfalantaj."

Post S-ro Elisseeff, S-ro Pierre Dangle, Vicurbestro de Parizo, salutis. Li akcentis, "Onisaburo diris, 'Arto estas la patrino de religio' kaj li montris la manieron, kiel percepti la aleston de Dio pere de la belo. Ni fieras ke nia Parizo estas la unua, kiu invitis la Organizon de Oomoto okazigi ekspozicion de verkoj de ĉi tiu granda artisto".

Mesaĝo estis sendita el Japanujo de S-ro Hidemi Kon, Ministro pri Kulturo, kaj Bonzo Tōkō Kon, Ĉefabato de Tendai-Budhismo, kiu ĉeestis la kunvenon, salutis, dirante, "Mi opinias ke Onisaburo estis granda persono, kia aperas nur unu fojon en jarmilo. Li elfaris tian miraklon en la historio de la potarto: li kreis tute novan ĝenron kaj produktis 3,000 pecojn, nomatajn Jōūan, en iom pli ol unu jaro. Ili estas senkomparaj en la mondo. Kiel japano mi en la mondo estas fiero pri liaj verkoj".

Entute pli ol 11,000 personoj vizitis ĉi tiun ekspozicion ĉe la Cernuschi-Muzeo en Parizo — nombro eksterordinare granda por ekspozicio en Francujo, kiel mi aŭdis, kaj do eĉ laŭnombro, oni diris, nia ekspozicio estis grandega sukceso.

Mi parolis kun multaj ĉe la ekspozicio. Juna sinjoro, poŝtoficisto en



Kvarobla husumo : *Pejzaĝo*

Parizo, diris, “El ĉiuj verkoj la Jōūan unue altiris min. Unuavide, ilia simpleco impresis min, sed strange, ili vekis al mi mensan staton por kontempladi ilin”.

Juna knabino diris, “Ĉi tiu ekspozicio montris al mi ke ekzistas alia koncepto pri la vivo, pri kiu ni konis nenion”. Sinjorino diris, “La ĝenerala impresio, kiun mi ricevis el ĉiuj verkoj de la ekspozicio estas tia, ke ili havas ion komunan kun la Katolika koncepto pri amo”. Maljuna sinjoro estis impresita de la ekspozicio kaj diris, “La koloro kaj brilo de la potaĵoj estas admirinde bela. La tekniko de la pentrado (t. e. tuĉado) absolute diferencas de tiu Eŭropa, sed kiel elvokiva ĝi povas esti uzante nur nigran inkon !”

“Mia vera valoro estos rekonita ekster Japanujo”

Rimarkoj skribitaj de F-ino Reva Remy plej impresis min. Leginte mian libron en la franca traduko: *Onisaburo Deguchi, Un Grand Homme*, ŝi jam konis la personecon — kaj nun la artverkojn — de mia avo. Ŝi publikigis artikolon en la monata gazeto, *Revue d'Informations* (en N-ro 19-20, 1972), en kiu ŝi skribis, “Ĉi tiu libro rakontas al ni la vivon de granda homo, kiu aktivadis en multaj sferoj. En 1925, kiam li estis 54-jara, li fondis mondan ligan de religioj kaj subtenadis Esperanton... Je proksimume la sama tempo alia granda aktivisto, Richard de Condanhove Kalergi, fondis la Tut-Eŭropan Ligon. Li naskiĝis 28 jarojn pli malfrue ol Onisaburo, kaj mortis 24 jarojn pli malfrue, en Julio 1972. Mi sentas ke la

nomoj de ĉi tiuj du fascinaj originaluloj estas nun kunigitaj en honoro". Min tre interesis ŝia komparo de mia avo kun la fondinto de la Eŭropa Ekonomia Komunumo.

Same kiel Condanhove-Kalergi iniciatis Tut-Eŭropan movadon kaj strebadis por la realigo de la Eŭropa Komunumo, tiel mia avo iniciatis Universala-Homaman movadon kaj strebadis por forigi la barojn inter la rasoj kaj popoloj. Li cetere kuraĝigis homojn asertante ke nepre efektiviĝos Monda Komunumo. Li predikis ankaŭ, ke ni plialtigu nian spiriton per arto, kaj montris mem ke la Belo konas nek Orienton nek Okcidenton.

La subpremado, kiun li devis suferi, kaj la ĥaoso, kiun kaŭzis la milito, subfosis lian sanon, kaj ŝajnis ke ĉiuj liaj ideoj, idealoj kaj atingajoj estis por ĉiam perditaj en la abismon de historio. Sed nun en Eŭropo oni komencas studi kun respekto Onisaburon Deguĉi. Li iam diris, "Mia vera valoro estos rekonita ekster Japanujo". Mi vidas en ĉi tiuj vortoj de mia avo lian fidon pri sia senmorteco.

Trad. T. Nakamura

VORTOKLARIGOJ

Nur jenaj vortoj ne troviĝas en la *Plena Ilustrita Vortaro*:

1) *Banzai*: Hura

2) *raku*-tipa: *raku* (aŭ *rakujaki*) estas unu tipo de la japana ceramiko, laŭ kiu oni faras per manoj kaj fingroj, sen uzo de tornilo, argilterajn potojn, vazojn, telerojn ktp, ilin glazuras kaj bakas en la forno hejtata per ŝtipoj je relative malalta temperaturo (700 ~ 900°C). Ĉar tiu vorto ofte ripetigas, kaj estas necesa, mi opinias oportuna esp-igi ĝin por nia komuna uzo: *rakuo* (tiu ceramika arto ĵus menciita); *rakua pot-farado*, *tebovlo*; *rakuaĵo*, ktp. Oni alte ŝatas la rustikan guston de rakuaĵo por uzado en la ĉanojo.

*3) *tennoo*: la Regnestro de Japanujo, fariĝinta "simbola" postmilite. (En PIV *mikado* referencas al kapvorto *tennoo*, kiu tamen estas perdita.)

*4) *ŝikiŝo*: artisma kvadrata paperplato, sur kiu oni tuĉdesegnas aŭ belskribas per peniko.

*5) *ĉanojo*: teceremonio

NOTO — Pri la vortoj markitaj per * (kaj aliaj japandevenaj vortoj uzitaj) oni povas legi artikolojn en la *Enciklopedieto Japano* (miscitita en PIV: "Japana Enciklopedieto"; ekz-e, nia iama gazeto el Parizo estis *Oomoto Internacia*, citebla de neniu arbitre en inversa vortordo).

T.N.

Tankaĵoj de Onisaburo

NIGRETA MANĜO

*Falĉita l' tuta
rikolt' aŭtuna iris
al bienulo,
kaj el la rizo restas
por nia tablo nulo.*

*Nigreta manĝo:
horde' kun eta rizo,
sardino sala ;
ĝin prenas mi, ŝvitanta
farmist' kun mano kala.*

*Rafanojn dikajn
ni kultivis, ne por ni ;
ni ilin ŝanĝis
en monon for en urbo,
kaj kelkan rizon manĝis.*

El Sonĝo de Mia Naskiĝloko

JUNAĜA REVO

*Ankoraŭ bubo,
kiom ofte ĉe l' Kastel',
mi amis vidi
blankmuran ĝian turon
sunbrilanta en ĉiel' !*

*Ho, min aŭskultu :
se dio estas io,
vi kial lasas
putriĝi ĉi kastelon,
he vi, Inari-dio !*

*Atendu iom,
kaj mi per propraj pagoj
ja restarigos
kastelon ! — jen mi bravis
en miaj junaj tagoj.*)*

El Sonĝo de Mia Naskiĝloko

*) Ĝuste sur tiu altaĵa tereno, kie iam elstaris la kastelo (= la Kamejama-Kastelo), Onisaburo poste fondis la Centron de Oomoto, Kameoka. — Noto de la Trad.

MONTO KAJ MARO

*Ho l' Aŝiŭake-
monto, — kiel majesta,
kiel kortuŝa! —
same je l' Di-epoko,
staras plu samaspekta!*

*Sur voj' irota
ĝis fora l' Norda Maro,
mi, pasloĝante,
nun aŭdas noktan pluvon
sur la Deŭa-kamparo...*

*Sur mar' puŝante
boaton per la stango
de kor' mondama,
mi venis longan vojon
ĝis Mijabarajama!¹⁾*

El Uta-Taglibro

1) Notindas pri du aferoj: la unua estas, ke la tri unuaj versoj de ĉi tankao rolas kiel speco de "kapkusena" epiteto de la du sekvantaj; la formo de tiu verstrio ne estas tute kliŝa, per ĝi la aŭtoro esprimas la spiritostaton, en kiu li strebas antaŭen sur maro, sed ekster tio, ĝi estas ornama kaj donas tonan aŭ bildan harmonion al la tuto — la bildan, kiu tamen ne estas reala, ĉar, kiel evidentas el la metafora uzo de la "stango", li ne veturas sur boato de li puŝata perstange; efektive li veturis sur ordinara granda ŝipo; — kaj la dua, ke la "kor' mondama" estas tiu pensanta aŭ zorganta pri la bono de la mondo (= *jo o omou kokoro*). Kp. — kvankam tiu esprimo uzita de l' aŭtoro estas japanpropra kaj senrilata — kun "Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke..." (S-ta Johano 3, 16). — Noto de la Trad.

MISLA RONDVOJAĜO

*Ho, de Rukjuo
ĝis Saĥalen', Kuriloj,
mi tra la lando,
kiom ĝuis la vojon
por sankta propagando!*

*Ĉi tiun jaron
ne rondiris la luno,
ne eĉ monaton,
sen vidi min vojaĝi
por misia plenumo!*

*Sen ke mi ĝuus
la belvidon de la Flor'
aŭ de la Luno,
mi vojis pro misio,
dume l' jaroj pasis for.²⁾*

El Uta-Taglibro

2) En la japana, "la Floro" plejofte reprezentas la florantajn sakurojn, kiujn oni ĝuas vidi en ĉiu printempo, sed, ĉi tie, aludas ankaŭ la florojn, kiujn la aŭtoro flegis en la ĝardenoj de Oomoto tra la jaro; "la Luno" estas kompreneble ĉiumonata, sed aparte tiu aŭtunmeza plenluno, kies serenecon laŭ la tradicio oni celebras en familia aŭ societa rondo. — Noto de la Trad.

PRI PREĜOJ

*Kion ni havas
indan sur la altaro,
kiel oferon?
Nenion, krom la koro
fidela antaŭ Dio.*

*Ho, nia preĝo
sincera kaj fervora,
se eĉ mallonga,
ja estos elaŭdita
de Dio favorkora!*

*Ni la preĝvortojn
recitas antaŭ Dio,
kun kor' en paco,
kiel nian tributon
da danko pro la graco.³⁾*

El Dia Vojo

Trad. T. Nakamura

3) Oni indulgu min, ke mi depruntis la kristanan terminon *graco*, por uzo en la ĝenerala senco de "Difavoro". — Noto de la Trad.

Planeda civitaneco – Esperanto

– senvianda dieto

Jen estas resuma teksto de la proponoj, kiujn Eizoo Itoo, Prezidanto de Universala Homama Asocio prezentis al la Dua Mond-Konferenco pri Religio kaj Paco, kiu okazis en Lovenjo, Belgio, la 3an de septembro pasintjara.

Ĉi-jare (1975) Universala Homama Asocio estas en sia 50-a datreveno de fondiĝo. Pri ĝia lastatempa aktiveco ni faros raporton en la venonta numero. — Red.

Propono pri registra kampanjo de planeda civitaneco

La registra kampanjo de planeda civitaneco, iniciatita en 1972 de s-ro U Thant, ekssekretario ĝenerala de UNO, s-ro Norman Cousins, prezidanto de WAWF (Mondasocio de Mondofederalistoj), d-ro Arnold Toynbee, kaj aliaj, estas tre taŭga rimedo revolucii la homan konscion, kaj pretigi necesan grundon por konstrui stabilan pacon — taŭga rimedo, tamen sukcese aplikebla nur, se kunlaboros multaj sindonaj homoj kun altaj idealoj.

Mi proponas ke nia Konferenco faru publikan deklaron, en kiu ĝi rekonas la utilecon de la Kampanjo kaj rekomendas al la religiistoj kaj religiaj organizoj pozitivan subtenon kaj kunlaboron en ĝi.

La planeda civitaneco estos registrita kun la jenaj rekonoj kaj ĵuroj.

Mi rekonas mian anecon en la homa komunumo ;

Mi rekonas mian apartenon al la homaro, dum mi rekonfirmas mian

apartenon al mia propra familio, komunumo, ŝtato kaj nacio ;

Por mi, kiel ano de la planeda familio, la bono de la monda komunumo estas la unua zorgo ;

Tial :

Mi laboros por finigi dividojn kaj militon ;

Mi laboros por la realigo de la homaj rajtoj — civilaj kaj politikaj, ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj — por ĉiuj homoj ;

Mi laboros por konformigi la agojn de nacioj al la bezonoj de la monda komunumo ;

Mi laboros por plifortigi kaj plibonigi la Organizon de la Unuiĝintaj Nacioj, — por ke ĝi havu la aŭtoritaton por agi laŭ la komuna volo de la homaro ;

— por ke ĝi bridu la ekscesaĵojn de nacioj,

— kaj alfrontu la komunajn tutmondajn danĝerojn kaj bezonojn de la homara familio.

Propono pri internacia lingvo

Se en la mondo disvastiĝos inter-

nacia lingvo, plenumanta senmanke la neprajn kondiĉojn: ekzemple, neŭtraleco, facileco, klareco, precizeco, tio nerefuteble faros grandan bonon por la homara kulturo kaj mondopaco.

Jen Esperanto — lingvo posedanta ĉiujn tiajn ecojn kaj pruvinta dum sia 90-jara ekzistado sian kompletan taŭgecon por ĉiuj celoj, scienco, literaturo, politiko, ekonomio ktp — estis oficiale rekonita kaj rekomendita de Unesko en la jaro 1954, per Rezolucio okaze de ĝia 5a Ĝenerala Kunsido, kaj la Universala Esperanto-Asocio fariĝis ĝia konsulta organizo neregistara.

Leo Tolstoj diris, ke oferi iom da tempo por lerni Esperanton estas devo de ĉiuj Kristanoj, kaj Romain Rolland asertis ke Esperanto estas

armilo por liberigi la homaron, kaj Papo Pio la XII rekomendis, ke Esperanto estu uzata por disvastigo de la Evangelioj.

Oomoto kaj Universala Homama Asocio, al kiuj mi apartenas, enkondukis Esperanton antaŭ 50 jaroj por sia internacia aktiveco kaj spertas kaj pravas ĝian mirindan taŭgecon. La Biblio, la Korano kaj Budhismaj sutroj ankaŭ estas jam de longe tradukitaj kaj eldonitaj. Fonditaj estas la internaciaj organizoj de esperantistoj kaj Katolikaj kaj Protestantaj, nomataj IKUE kaj KELI.

Dezirante ke la partoprenantoj de ĉi tiu Konferenco volu rekonii la praktikan utilecon de Esperanto, klopodi ĝian disvastigon, mem lerni ĝin kaj praktike uzi ĝin en la sekvontaj Konferencoj por rekte inter-



E. Itoo meze sidas en konferencejo

kompreniĝi, sen tradukaj ĝenaĵoj, mi proponas ke nia Konferenco fondu komitaton kiu pristudos la problemon de internacia lingvo rilate la mondopacon kaj religion.

Propono pri senvianda nutrado

Konsiderante 1e, ke la senvianda nutrado estas ne nur konvena al la sentoj de pieco, respekto al vivo kaj pacamo, sed ankaŭ pozitive helpas ilian plifortiĝon ĉe homoj, kiuj ĝin praktikas,

Konsiderante 2e, ke la senvianda nutrado estas tre bona por la sano, laŭ la aserto de elstaraj kuracistoj, laŭ la ekzemploj de multaj praktikantoj kaj ankaŭ laŭ mia propra sperto,

Konsiderante 3e, sed neniel malplej grave, ke la pervianda nutrado estas tre malekonomia maniero uti-

ligi la produktivon de la grundo, ĉar ekzemple, por ke ni prenu 1 kalorien el bovaĵo, oni bezonas doni al la bovo 30 kaloriojn el greno kaj herbo, tiel ke eĉ estas kontraŭmorale sin nutri per viando, kiam sur la tero diversloke amasoj da homoj suferas pro manko de nutraĵo kaj eĉ mortas de malsato,

Mi proponas ke la religiistoj kaj religiaj organizoj klopodu por disvastigi la kutimon de senvianda nutrado kaj observu la fastajn tagojn laŭ sia tradicio, kaj ke tiuj, kiuj ne havas tian tradicion, difinu, ekzemple, ĉiusemajne unu tagon de senvianda nutrado.

Atentigo: mi ne proponas la severan vegetarismen, kiu evitas eĉ fiŝojn kaj moluskojn, nek fanatike ignoras la ekziston de kelkaj lokoj kaj kazoj, ĉe kiuj la senvianda nutrado estas nepraktikebla.

Arteskpozicio de Onisaburo kaj lia Skolo en Usono, Kanado

The Cathedral Church of Saint John the Divine

112th Street At Amsterdam Avenue, New York, N. Y. 10025

14 mar. ~ 18 apr.

Brockton Art Center

Oak Street on Upper Poster's Pond, Brockton, Mass. 02401

1 maj. ~ 15 jun.

Chautauqua Institution

Chautauqua, N. Y. 14722

4 aŭg. ~ 24 aŭg.

The Art Gallery of Greater Victoria

1040 Moss Street, Victoria, B. C. V8V 4P1, CANADA

30 sept. ~ 26 okt.

Oomoto

1-a Pacifika Kongreso de Esperanto

20-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso

Kongresaj Informoj

- Kongresejo :** La Pacifika Kongreso okazos en Kolegio Queens de la Melburna Universitato, en bela parksimila ĉirkaŭaĵo, tamen nur 10 minutojn de la Melburna Komerca Centro.
- Daŭro :** De Dimanĉo, 4-a Jan. 1976 ĝis Sabato, 10-a Jan. 1976
Post-Kongresa tuttaga ekskurso : Dimanĉo 11-a Jan. 1976.
- Kongres-Kotizoj :** Antaŭ 1-a Julio 1975 : \$ 9.50 (aŭstraliaj) Studentoj \$ 5.00
Post 1-a Julio 1976 : \$11.00 (aŭstraliaj) Studentoj \$ 6.00
- Salono "Hideo Jagi" :** Memore al la karmemora, elstara japana esperantisto kaj iama Prezidanto de U. E. A. la granda kaj luksa manĝ-salono estos nomita "Salono Hideo Jagi". Kongresanoj manĝos tie ĉiutage kaj ĝi estos ankaŭ loko de la kongresa Bankedo.
- Loĝado :** Ĉiuj kongresanoj loĝos, manĝos kaj kongresos en la bela Kolegio Queens. Loĝado estos en komfortaj unulitaj ĉambroj.
- Kosto :** Pro ĉiam altiĝantaj prezoj la ĝusta kosto ne estas precize antaŭdirebla, sed la ĉambro kaj 5 (kvin) manĝoj kostos proks. \$ 12~12.50.
- Aliĝoj :** Sendu vian kongreskotizon, kune kun \$ 10 ĉambro-rezervo al
Pacifika Kongreso de Esperanto
Post Box 2122 T.,
G. P. O. Melbourne, 3001, Aŭstralio
- Oficiala Flugkompanio :** AIR NEW ZEALAND, kiu donacis \$ 150 al la Kongresa Komitato por speciala broŝuro. Ni sendos al vi kvanton de ĝi kiam ni ricevos ĝin de la presisto.
- Adresoj :** Ĉe "Japan Air Lines" ĉe Asahi Shimbun Domego.
3-3 Nakanoshima, Kita-ku, **Osaka**. Tel : (06) 203-5141

GRAVEGA LABORO FARENDA....

La Tutmondistoj trovas antaŭ si gravajn barojn pro la naciistaj emoj ankoraŭ ege akraj en la menso de plejmultaj el la homoj. Al ĉi tiuj, monda federala registaro ŝajnas tute utopia, kaj cetere tiu ilia penso estas iom ĝusta, ĉar tia registaro estas nepre ne baldaŭ kreota.

Pli facila eble estus la kreo de tutmondaj organizoj, ĉiu por tute speciala funkcio.

Jen afero, kiu povus konduki al starigo de tia organizo: la savo de viktimoj de naturaj katastrofoj.

Certe ekzistas jam naciaj asocioj, jen ŝtataj, jen privataj, kaj eĉ internaciaj asocioj, kiel la "Ruĝa Kruco" en la kristanaj nacioj kaj "Ruĝa Lunarko" en la islamaj nacioj.

Sed tiuj asocioj, unue, ne povas agi sufiĉe rapide, ĉar la traktado inter ili kaj la ŝtato, kie okazas katastrofo, necesigas iom da tempo, kaj perdo de tempo signifas la morton de eble miloj da viktimoj; due,

ili ne posedas ĉiujn rimedojn, kiujn ili kelkfoje tute ne povas agi, se ilia ŝtato rifuzas helpon al eksterlandanoj aŭ rifuzas la permeson de transpaso de aviadiloj super sia lando.

Tio fariĝis evidenta en la kazo de la cunamo en Orienta Pakistano en 1970, kiu ne povis ricevi helpon de la Okcidenta Pakistano pro rifuzo de Hindujo al transpaso de la aviadiloj. Ankaŭ dum la tertremo en Irano, ĉar tiu lando rifuzis eksterlandan helpon.

Komence de 1971, konsiderante tiun situacion, kelkaj homoj organizis provizoran komitaton por krei "Mondan Helpadan Agentojn", kiu estus liberigita de tiuj baroj.

Michel Cépède, prezidanto de la F. A. O. (organizajo ligita al la UNO), akceptis la prezidantecon de tiu komitato kaj P. Juvigny, prezidanto de la Komisiono de UNO por la protekto de la "Malplimultoj",

Ĉambro 906, Hibiya Park Domego, 1-Chome, Yuraku-Cho
Chiyoda-Ku, Tokyo. Tel : 213-0968

20-a Aŭstralia E-Kongreso : Ĉiuj eksterlandaj kongresanoj rajtos SEN PLUA kotizo partopreni la aŭstralian kongreson de la 2-a ĝis 4-a de Januaro, 1976, en la sama kongresejo.

Re-afranko : Por ricevi kvitancon por kongreskotizo kaj ĉambro-rezervo, aldonu 2 internaciajn respondkuponojn.

bonvolas kunlabori.

Internaciaj Asocioj tuj aliĝis :

Asocio por helpi la “Volontulojn d’ Emmaüs” (Abato Pierre) — Asocio por la Universala Paco — C. I. M. A.-D. E. (Protestantreligia Asocio) — Mondcivitanoj — Konstruantaj Kunuloj — Internacio de la Militrezistantoj — Amikoj de la Tero — Kristana Movado por la Paco — Internacia Movado por Repaciĝo — Internacia Civila Servo — Societo de la Amikoj (Kvakeroj).

Studa dosiero estis prezentita al la Ĝenerala Asembleo de la UNO en decembro 1971. Post kelkaj monatoj, rezolucio estis akceptita de 85 nacioj. Jen la teksto de tiu rezolucio :

“La Ĝenerala Asembleo rekomendas :

Ke Kunordiganto por Helpoj estu nomumita de la Ĝenerala Sekretario,

Ke Kunordiganta Ofico estu direktata de la Kunordiganto por Helpoj, ke ĝia sidejo estu en Ĝenevo, ke ĝi organizu unuon apartan de la Sekretariato de la U. N., por inviti krome ĉiujn specialajn organizaĵojn de UNO kaj ĉiujn interesatajn organizaĵojn, kunlabori kun la “Kunordiganto por Helpoj” okaze de katastrofoj”.

La jura afero ĉe la supro estas do komencita. Sed restas farota multe da strebado por atingi la celon :

1) starigon de 6 starpunktoj disigitaj sur la tero ne malproksime de la landoj plej ofte trafitaj de katastrofoj,

2) liberan transiron por la avia-

diloj kaj ĉiuj veturiloj trans la landoj kaj la aerspaco de la aliĝintaj ŝtatoj,

3) partoprenon de la ŝtatoj en la financado de la “Monda Helpada Agentejo”.

Nun pri la praktika fundamenta flanko : necesas varbi volontulojn, kiuj bonvolos ekzerci sin en tiaj kaj tiaj antaŭzorgoj por sav-agadoj, dum provtempoj. Ekzistas jam la Asocio de la “Senlimaj Kuracistoj”.

Jam kreĝis franca, hinda, belga kaj tunizia grupoj. Kelkaj el ili havis okazon utili en Tunizio, kie, pro inundoj 83 homoj pereis kaj 26000 estis senigitaj je siaj domoj ; en Sud-Francio, kie ofte okazas arbarfajregoj, k. t. p.

Senbezone diri, ke en la tuta mondo, la mondaj federalistoj kaj multaj samcelaj asocioj devus, se ili volas akordigi sian vivon kun siaj opinioj, partopreni tiun agadon ĉe la jura flanko kaj ĉe la praktika flanko.

Ili samtempe celus

la realigon de iu funkcia federala organismo

kaj la savon de multnombraj homoj kaj helpon al tiuj, kiuj pluvivas post la katastrofo, sed kiuj vivas poste sub malbonegaj kondiĉoj.

Gravega laboro farenda... Kiu volas helpi ?

*

Adreso de la “Corps Mondial de Secours”, Sekretariato : 129, Rue du Faubourg Poissonnière 75009 Paris.

Ginekologiaj (virinaj) malsanoj

Kvankam iom konvencie, ni povas dividi la seksajn organojn de virino en eksterajn kaj internajn.

La eksteraj (pudendo) etendiĝas de la pubo ĝis la anusoj, kaj konsistas el: 1) La puba monto aŭ monto de Venuso, elstaraĵo antaŭ la vulvo, kovrita de haroj. 2) La klitorio, erektiĝema organo, situanta ĉe la antaŭo de la vulvo, sidejo de la seks-ekscitiĝo. 3) La himeno, faldo aŭ membrano, kiu fermas parte la enirejon de la vagino. 4) La nimfoj aŭ minoraj lipoj, ĉe kies interna flanko troviĝas la duktoj de la Bartolinaj glandoj. 5) La majoraj lipoj. Inter klitorio kaj la himeno situas la uretra orifiko.

La internaj seksaj organoj de virino troviĝas en la pelva kavo: 1) La ovarioj, en kiuj formiĝas, evoluas kaj maturiĝas la ovoloj. 2) La salpingoj aŭ uteraj tuboj, duktoj situantaj inter la ovarioj kaj la utero. 3) La utero, kie la fekundigita ovolo fariĝas ovo, kiu mem transformiĝas al feto. 4) La vagino, kanalo inter la utero kaj la vulvo (= eksterajo de la seksaj organoj de virino), estas la organo de la koplando.

La mamoj, elstaraj partoj de la brusto ĉe virinoj, kiuj entenas la

laktajn glandojn, konstituas komplementajn organojn de la naska aparato.

Normale la ovario komencas sian aktivecon, kiam la knabino estas 13~15-jara. Matura ovolo ellasita de tiu organo penetras en la salpingon kaj poste en la uteron. Se ĝi ne estas fekundigita, ĝi estas elpelita kun akompano de pli-malpli abunda sangelfluo (ĉirkaŭ 200~300-grama) dum 3-4 tagoj. Tiu funkcio, nomita menstruo, ripetiĝas ordinaro ĉiu 28-tage, kaj ĉesas, kiam la virino estas 45~50-jara (menopaŭzo).

Se la ovolo estas fekundigita fare de spermatozoo (matura vira sekso-ĉelo), ĝi fariĝas ovo, kaj enplantiĝas en la utera mukozo, kie ĝi progresive disvolviĝas.

Ĉe la fino de la tria monato de gravedo jam diferenciĝas la placentoj, spongeca kaj mola organo kunliganta la uteron al la embrio pere de la umbilika ŝnuro. Tra tiu ĉi la embrio, kiu jam fariĝas feto, ricevas sian nutraĵon de la patrina sango.

Naŭ monatoj post la fekundiĝo, la patrino elpuŝas el la utero la maturan feton (akuŝo).

*

Ni ekzamenos la plej oftajn virinajn malsanojn kun indiko de la

koncerna terapio.

Vulvito estas inflamo de la vulvo karakterizita per jukado, brulsento kaj dolora urinado, kiuj malfaciligas la marŝadon. La majoraj lipoj kaj eĉ la haŭto de la najbaraj regionoj de la femuroj prezentas ŝvelon, ruĝecon, doloron kaj plialtiĝon de la temperaturo. Se temas pri gonokoka infekto, plejofte la uretro kaj la Bartolinaj glandoj partoprenas samtempe en la inflamo. Kaj kelkfoje la ingvenaj limfadenoj (limfonodoj) estas ankaŭ afekciitaj (limfadenito).

Por eviti komplikajojn kaj sekvaĵojn, oni devas tuj fari la jenon:

Se la inflamo estas intensa, enlitiĝu; se ĝi estas neintensa, la ripozo povas esti relativa. Vegetara dieto (la unuajn tagojn manĝu nur fruktojn kaj krudajn salatojn). Trinku infuzojn de urinigaj kaj trankviligaj plantoj. Lavu ofte la koncernan regionon per 1 kulerpleno da oksigena akvo je 10 volumenoj miksitaj kun 1 aŭ 2 kulerplenoj da komuna akvo aŭ per dekokto de kamomilo aŭ de linsemoj aŭ de papavetoj aŭ de malvo aŭ per sala tepida akvo aŭ per solvaĵo de natria bikarbonato en tepida akvo. Unu- aŭ dufoje ĉiutage prenu tepidan sidbanon en la ĉisupre indikitaj likvaĵoj.

Se temas pri jam kronika vulvito, prenu sunbanojn, vaporbanojn al la malsupra duono de la korpo, kaj faru ĉiumatene frotadon de la malsupra parto de la ventro.

Skrupule lavu al vi la manojn tiom ofte kiel necese por eviti plu

infekti vin (gonokoka konjunktivito, k. t. p.) kaj aliulojn.

Bartolinito estas inflamo de la Bartolinaj glandoj, ofta komplikajo de la vulvito. Ĝi manifestiĝas per pligrandiĝo de la respektiva majora lipo kaj doloro, kiu propagiĝas al ingveno kaj perineo. Aperas ankaŭ febro (38° C), senapetiteco, saburo, k. t. p. La kuracado estas samkiel indikite por vulvito. Krome apliku surloken malvarmajn kataplasmojn el argilo.

Vulva jukado povas ŝuldiĝi al kaŭzoj lokaj (skabio, micetozo, pedikoj kaj aliaj parazitoj, blenoragio, malpureco, masturbado, dermatozoj, k. t. p.) aŭ ĝeneralaj (diabeto, senvitaminozo, alergio, anemio, leŭkemio, neŭrozo, k. t. p.). En ĉiu kazo la kuracado dependas de la vera kaŭzo de la jukado.

Vaginito estas inflamo de la vagino karakterizita per pezosento, jukado, doloro kaj pusa elfluo.

Cervikito estas inflamo de la utera cerviko aŭ kolo, pli mallargha parto de la utero, kiu penetras en la vaginon. Ĝiaj simptomoj similas tiujn de vaginito, kaj la kuracado de ambaŭ estas la sama de vulvito. Sed, anstataŭ lavi la vulvon, faru ĉiutage 1 aŭ 2 vaginajn enŝprucigojn per 1 litro da dekoktoj kaj aŭ solvaĵoj indikitaj en "Vulvito".

Oni devas eviti la kaŭteradon de la utercerviko, kiun kelkaj kuracistoj ankoraŭ faras, ĉar ĝi estigas poste cikatrajn kuntiriĝojn, kiuj siavice kaŭzas diversajn perturbojn.

(*daŭrigota*)

Sekvanta, Sekvonta, Sekvinta

(*fino*)

Yosio Oosima

Tamen en la *sekvinta* tago de mia transloĝiĝo, elironte por promenado frumatene, je mia surppizo mi trovis, ke [...] (El Japana Literaturo, 1965, p. 109)

Ter. Isiguro

La *sekvintan* tagon, nome la 28-an, je la 10-a horo matene la kongreso estis malfermita en la gubernia biblioteko. (La Belan Pacon, 1959, p. 16)

Miyamoto M.

Kun tia espero, la *sekvintan* tagon mi aliformigis mian vizaĝon, [...] (El la Vivo de Syunkin, 1968, p. 16)

Waseda yutaka

Sekvintan tagon Maruŝa (de iam mi vokis ŝin per la karesnomo) invitis min. (Sub la Nordaj Lumoj, Sennacieca Revuo, n-ro 92, 1964, p. 16)

Sekvintan tagon kun favora konsento de Uŝaĥin kaj Miĥailjukov mi sukcesis eniri en la lernejon. (samloke, p. 17)

Huzimoto tacuo

Post tio tiu revenis hejmen, kaj kiam li denove venis tien en la *sekvinta* mateno frue, [...] (Japanaj malnovaj Rakontoj, 1965, p. 54)

Post la uzo oni bone lavis kaj viŝis ilin, reportis ilin al la sama loko en la *sekvinta* tago, [...] (samlibre, p. 55)

Kjuzo Ito

[...] kaj la eldonado okazis en januaro de la *sekvinta* jaro, la dua de Meiji (1869). (Rangaku Kotohajime, 1971, p. 78)

S. Nishi

La *sekvintan* tagon ni kunsidis ĉe Rjotaku kaj malfermis la libron. (samlibre, p. 15)

La *sekvintan* jaron li tamen feliĉe sukcesis dissekci la unuan fojon inan kadavron, [...] (samlibre, p. 62)

T. Takesita (Bam Buo)

Proksime la tigran horon (nuna la kvara) matene de la *sekvinta* tago, Genpaku eliris [...] (samlibre, p. 92)

Nguen Minh Kinh

La *sekvintan* tagon, Lang San ankaŭ estis atakita. (Anekdotoj pri la Vivo de Prezidanto Ho Chi Minh, 1960, p. 115)

Cezaro Rossetti

La *sekvintan* matenon, dum Anjo kaj mi alproksimiĝis al la enirejo de la foiro, viro venis al mi kaj etendis la manon. (Kredu min, Sinjorino! 1951, p. 85)

La *sekvintan* tagon policano venis kaj parolis al Liza. (samlibre, p. 242)
Vilho Setälä

Ĝin sekvis ĝenerala societo La Polusstelo, kiu dum la *sekvintaj* 15 jaroj estis centro de la Esperanta agado en Finnlando. (La Esperanto-Movado, 1948, p. 55)

En *sekvinta* januaro li la unuan fojon ĉeestas la konsistorion de la universitato kaj tie la unuan fojon en la historio eldiras sian opinion en finna lingvo. (Emil Nestor Setälä, Monda Kulturo, 1964)

A. Simeonov

La *sekvintan* tagon Irmov iris en la gimnazion, [...] (Bulgara Prozo, 1960, p. 14)

G. Waringhien

26 estis anstataŭitaj de novaj vortoj, ĝenerale lanĉitaj de Zamenhof mem, kaj tial poste oficialigitaj en unu el la *sekvintaj* OA. (Lingvo kaj Vivo, 1959, p. 89)

Sed liaj kritikoj ne malhelpis Zamenhof plu uzi la samajn verbigojn en ĉiuj siaj *sekvintaj* verkoj: (samlibre, p. 119)

T. Pumpr

En la *sekvinta* jaro (988) la rusoj sieĝis la grekan urbon Korsun Ĥersonesos) sur la duoninsulo Krimeo kaj konkeris ĝin. (La Bapto de Caro Vladimir, 1953, p. 116)

K. Bein (Kabe)

En la *sekvinta* tago Ramzes sendis sian Negron kun ordonoj Memfison, ... (La Faraono 2, 1957, vol. 1, p. 143)

En la *sekvinta* mateno Tutmozis kun granda sekvantaro de la oficiroj kaj korteganoj vizitis la tiran princon kaj. . . (La Faraono 2, II, 1957, p. 57)

Tuj en la *sekvinta* tago, la 13-an de Paofi, granda procesio havis lokon. . . (La faraono 2, III, 1957, p. 226)

Juhani Aho

Sed *sekvintan* nokton li estis pli kuraĝa. (Malgaja rakonto pri leporido, Esperanta Finnlando, n-ro 12, p. 32)

Josef Vondroušek

La skribinto de ĉi-rememoro havis la neordinaran honoron gastigi dum la *sekvintaj* kvar tagoj Dron K. Kalocsay k L. Totsche en sia hejmo. (Rememoroj, La Nica Literatura Revuo, n-ro 35, 1961, p. 184)

Ivan Sarafov

La *sekvintan* matenon Kevork ne malfermis la butikon. (Bulgara Prozo, 1960, p. 193)

Murata keinosuke

En la *sekvinta* tago Kihê iris sola en monton por haki arbojn. (Japanaj Malnovaj Rakontoj, 1965, p. 39)

S. Hori

En 1894 A. H. Harper faris unuafoje esploron pri la glacirivero kaj lia rezultato ludis grandan rolon por la *sekvintaj* studoj. (La Vojaĝo al Novzelando, 1972, p. 39)

La *sekvintan* vesperon mi estis invitita de D-ro Ballentine. (samlibre, p. 38)

V. N. Devjatnin

La tutan *sekvintan* tagon mi jam ne legis, sed fervorstudadis la libreton, (La Nova Etapo, 1932, p. 122)

Adolf Capf

En la *sekvinta* monato de 1945 d-ro Kabe revenis al Lodz — al sia hejmloko de sia infaneco kaj juneco, (Pola Esperantisto, 11-12, 1959, p. 9)

Paul Nylén

En la somero de la *sekvinta* jaro, 1892, estante studento, mi restadis kelkajn monatojn en la landparto (Antaŭen al la laboro! La Duondormanto, n-ro 6)

SEKVA

K. Kalocsay

En la *sekvaj* linioj mi intencas konstati la regulojn de la vortkunmeto. (Lingvo Stilo Formo, 1931, p. 12)

L. Tárkony

La *sekvan* tagon ni renkontiĝis en la hungara ambasadorejo en Moskvo: (Kiu scias hungare? Hungara Vivo, n-ro 4, 1973, p. 12)

P. Neergaard

ili floras kaj gajnas la *sekvan* jaron. (La Vivo de la Plantoj, 1957, p. 44)

A. Mildworf

[...] prof. Einstein formuligis la postulon de la tempo en *sekva* maniero. (Homaro, tekniko kaj Esp-o en la Atoma Epoko, Mondano, n-ro 5, 1968, p. 16)

Redaktora Postnoto

Nia amiko K. Matuba en sia artikolo prezentas al ni ankoraŭ netuŝitan flankon de la participa eksproblemo, nome, la aktivan: efektive, kiel la multaj ekzemploj de li cititaj montras, la uzado de la aktivaj participsufiksoj por derivi la adjektivan formon de *sekv-* ne estas unueca ĉe niaj aŭtoroj kaj verkantoj. Kiuj el niaj legantoj bonvolus fari al ni kontribuojn por meti iom da ordo en ĉi "embaraso de riĉeco" de nia lingvo? — T.N.